



KONGA STELO

Nyota ya Kongo



Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizaĵo)
kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.



Enhavo

Front- paĝe :

Hubert Ntawu kaj Emile Malanda

Redakcie1

La 9a Afrika Kongreso de Esperanto
(AKE),2

Kongreso de ILEI3

Intervjuo4

IJK 2026..... 5

Esperanto en Norda Kivuo..... 6

Internacia Tago de Virinoj..... 8

Unua Tanzania E-Safaro10

Filantropia vizito.....11

Kutimu agi nun.....13

Stulta mielvendisto14

Lingvoj : subjektaj pronomoj..... 16

Nekrologo : Emile Malanda..... 17

Nekrologo : Hubert Ntawu20

Redakcie Joel Muhire



Saluton!

Mi esperas, ke ĉiuj niaj legantoj bonfartas. Lerninte Esperanton, ĉiuj novuloj tre ŝatas komenci praktiki Esperanton. Por tiu okazo, ĉie tra la mondo esperantistoj organizas renkontiĝojn, kongresojn ne nur ĉeestajn sed ankaŭ virtualajn; ekzemplo de tiaj renkontiĝoj estas Universalaj Kongresoj de Esperanto (UEA), Internaciaj Junularaj Kongresoj (TEJO), Internaciaj Kongresoj de Edukado (ILEI), Virtualaj Kongresoj, Landaj kongresoj, kontinentaj kongresoj, Kantoparado, AMO-seminarioj, ktp. Ĉi-numere, vi informiĝos pri diversaj tiaj renkontiĝoj, kaj povos ekscii mem pli pri renkontiĝoj el <https://eventaservo.org>. Françoise Noireau intervjuis por Konga Stelo s-inon Alexandrine Omba pri kiel Esperanto fariĝis ŝia familia lingvo, denove interesa raporto pri ETIMARKI kaptos vian atenton, Prime Nsabimana konsilas nin: "*Kutimu aĝi nun*". Kiel kutime, Joel Muhire prezentas al vi la sekvon de la leciono pri la personaj pronomoj en la ŝuahila. *Nekrologo*: forpasis du el la pioniroj de Esperanto en DR Kongo, s-roj Emile Malanda kaj Hubert Ntawu. Ni kore kondolencas iliajn familianojn kaj amikojn!

La retejo de Konga Stelo estas:

https://uea.org/vikio/Konga_Stelo_Revuo.

Kiel sendi kontribuojn al Konga Stelo?

- ✓ Prefere sendu tekston originale verkitan en Esperanto kun foto/bildo memfarita.
- ✓ Se vi sendas tradukaĵon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Pri fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Bonvolu sendi vian artikolon rete kiel kutiman retmesaĝon aŭ en format RTF al: joelmuhire0@gmail.com plej laste, je la fino de ĉiu tria monato.
- ✓ Viaj kontribuoj povas temi pri e-agado en via loĝregiono, poemoj, kulturo (manĝaĵo, vivmaniero, bredado, transporto, ktp), naturo, rakontoj, humuraĵoj, lingvoj, ktp.

Koran antaŭdankon pro via kontribuo!

DKEA: Demokratia Kongolanda Esperanto Asocio, fondita en 1963.

DKEJO: Demokratia Kongolanda Junulara Organizaĵo, fondita en 1984.

ILEI: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. www.ilei.info.

Konga Espero (KS) estas trimonata informilo de DKEJO (*Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizaĵo*) eldonata kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.

Redaktoro: Joel Muhire

Kontaktoj: joelmuhire0@gmail.com, Tel. +243 977 643 030

Por subteni la redakcian laboron: *FEL-konto*: oelm-x

Provleganto: Françoise Noireau, desiredapprendre@gmail.com

La estraro de DKEJO (2025-2028)

Prezidanto: Waziwazi Grâce, Tel. +243 976 413 837, rete: dkejo@outlook.com.

Vicprezidanto: Ramazani Nanjira, Tel. +243 981 137 264

Sekretario: Jofina Mungosy, Tel. +243 979 051 901

Kasisto: Ornella Idumba, Tel. +243 970 702 532

Konsilanto: Carine Idumba, Tel. +243 893 174 046

9-A Afrika Kongreso de Esperanto

Kongresa Organiza Komitato (KOK) – Togolando

Oni jam povas aliĝi al la 9a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), unu el la plej gravaj tradicioj en la kontinenta esperantista komunumo, kun partoprenantoj el diversaj anguloj de Afriko, Eŭropo kaj aliaj regionoj de la mondo. La ĉi-jara renkontiĝo anonciĝas kiel promesplena unika okazo por interkultura dialogo, lingva praktiko kaj amikeco trans kontinentoj, post Tieso en Senegalo kaj post la 109a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio. La ĉi-jara AKE okazos en Kpalime, Togolando, de la 26a kaj 31a de decem-



bro 2026. La kongresejo, hotela komplekso Cristal, estas facile atingebla kaj provizas bazajn tamen bonajn kondiĉojn por ĉiuj partoprenantoj. La aliĝo jam malfermiĝis

rete, kaj la fruaj aliĝintoj ĝuos reduktitan koston. Ni instigas ĉiujn senprokraste aliĝi, ĉar la nombro de lokoj estas limigita.

La aliĝ-formularon bonvolu plenigi ĉe <https://mallonge.net/ake-9>. Sur ĝi eblas legi ankaŭ detalojn pri loĝado kaj manĝoj, dum informoj pri ekskursoj, eventuale ankaŭ pri antaŭ- kaj postkongresoj, vojaĝaj konsiloj, la detala programo, nomlisto de aliĝintoj kaj aliaj prikongresaj novaĵoj aperos baldaŭ en la kongresna retejo, kiu nun estas en konstruo.

La 9a AKE ne estas nur kongreso, sed vivanta pruvo de la forto de Esperanto kiel ponto inter popoloj el diversaj kulturoj. Aliĝu hodiaŭ por jam registri vian nomon sur la nomlisto de la kongresanoj, kiuj estos esperantistoj el Afriko, Eŭropo, Ameriko, Azio kaj aliaj regionoj de la mondo kun ĝuo de komuna lingvo kaj komuna idealo*.

Togolanda Ministro fariĝas la Alta Protektanto de la 9-a Afrika Kongreso de Esperanto

 El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

La Organiza Komitato de la 9-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) kun granda entuziasmo kaj fiero anoncas gravan sukceson por la ĉi-jara tutkontinenta renkontiĝo. Per oficiala letero datita la 18-an de februaro 2026, la Ministro pri Turismo, Kulturo kaj Artoj de Togolando, S-ro Isaac Tchiakpe, akceptis fariĝi la Alta Protektanto de la kongreso. La oficiala patroneco de la Ministro

Tchiakpe ne nur donas al la kongreso altan diplomatan nivelon, sed ankaŭ konfirmas la malfermitecon de la togolanda registaro al nuntempaj iloj por kultura kaj turisma integriĝo.

La 9-a AKE disvolviĝos de la 26-a ĝis la 31-a de decembro 2026 en la pitoreska urbo Kpalime. Konata pro siaj verdaj montoj, vigla arta sceno kaj gastama loĝantaro, la kongresna urbo estas



konvena loko por gastigi la partoprenantojn el la tuta afrika kontinento kaj de aliaj partoj de la mondo. Sub la temo "Esperanto, lingva ponto por senlima Afriko", la 9-a AKE celas esplori kiel la internacia lingvo povas: a) faciligi la komunikadon inter

afrikanoj de diversaj lingvaj fonoj; b) konigi kaj valorigi la togolandan kulturon kaj turismon al internacia publiko kaj c) subteni la vizion de unuigita, senlima kaj kunlaboranta Afriko.

En mondo, kie lingvaj baroj ofte malhelpas ekonomian kaj kulturan interŝanĝon, la elekto de Togolando kiel gastiganto de la tutkontinenta evento poziciigas la landon kiel unu el la avangardaj centroj en Afriko por neŭtrala kaj egalececa komunikado, kaj celas honori enlandajn aktivulojn, reliefigi la turisman potencialon de la lando kaj la gastamon de la popolo. La akiro de tiu ĉi subteno cetere kontribuas al la strategia plano de UEA, AKIRI, aparte al la celo Konsciigo de la kampo Informado kaj al la

celo Politika Agnosko de la kampo Rilatoj. UEA kaj la Afrika Komisiono danke salutas la Altan Protektanton de la 9-a AKE kaj afable invitas la afrikajn esperantistojn, same kiel la alikontinentajn esperantistojn, konsideri vojaĝon al Kpalime, la scenejo de "Senlima Afriko", por la jarfino 2026.

Okazanta regule por plifortigi la ligojn inter la diversaj landaj asocioj, klubanoj, unuopuloj kaj prezenti la progreson de la lingvo en Afriko, la Afrika Kongreso estas la plej grava renkontiĝo de la afrika movado. Ĝi tradicie kunvenigas partoprenantojn el dudeko da landoj de pli ol unu kontinento.

UEA dankante afable spronas ĉiujn plusendi tiun ĉi komunikon al siaj lokaj komunik-listoj aŭ publikigi ĝin en diversaj revuoj. Bonvenaj estas ankaŭ donacoj :

(uea.org/alighoj/donacoj/afriko) por ebligi la partoprenon de junaj lernemaj afrikaj esperantistoj en la Afrika Kongreso. Ĉiu eta subteno havas grandan valoron en la konstruo de pli kaj pli forta afrika E-komunumo. Kaj same grave – se vi ankoraŭ ne registriĝis por la 9-a AKE ne prokrastu tion.

ILEI kongresos en Ĉinio

En 2026 la Kongreso de ILEI okazos ĉe Zaozhuang-a Universitato, en urbo Zaozhuang de Shandong-Provinco de Ĉinio, de la 10-a ĝis la 16-a de julio. La evento okazos kunlabore kun la Universitato mem, kiu estas sidejo de la plej granda Esperanto-Muzeo de Azio kaj de la sola Esperantofako nuntempe aktiva kaj oficiale agnoskata de la Ĉina Registaro. La temo de la Kongreso estas "Eduki profesiajn esperantistojn kaj protekti Esperanto-kulturon", dum la Simpozio esploros pli science la temon "Plialtigi lingvan konscion", tre gravan en tempoj de A.I. La unuaj tagoj de la Kongreso havos bun-

tan prelegprogramon, inkluzive de tri seminarioj pri la kongresa temo kaj de du-taga Simpozio kun la partopreno de doktoroj kaj profesoroj el diversaj landoj. La lastaj tri tagoj de la Kongreso estos tute dediĉitaj al la esplorado de la kultur-riĉa provinco Shandong, hejmloko de famaj filozofoj kiel Konfuceo kaj Mozi. Bonvolu rapide aliĝi per la formularo:

<https://forms.gle/LVbz3WHLfAnrZbFA6>.



INTERVJUO

Françoise Noireau – Francio, Alexandrine OMBA – Kinŝaso, DRK

Françoise Noireau, estas instruistino de Esperanto el Francio prizorganta la esperantan kursoprogramon kunlabore kun UEA kaj ILEI (pli detale legu ŝian artikolon en Konga Stelo, numero 4a, p. 6. Françoise Noireau faris por nia revuo interesan intervjuon kun Aleksandrine Omba, instruistino de Esperanto el Kinŝaso kiu sukcesis esperantistigi sian familion.



Françoise Noireau (FN): Kiam en via familio komenciĝis la uzado de Esperanto?

Aleksandrine Omba (AO): Nu, tio komenciĝis en 2008, simple en nia ĉiutaga vivo.

FN: Kiuj familianoj parolas Esperanton?

AO: Komence ni uzis ĝin nur hejme. Poste ankaŭ kuzoj kaj kuzinoj ekparolis ĝin. Entute ni estas ĉirkaŭ kvin.

FN: Kiun metodon vi uzis?

AO: Mi uzis la rektan metodon: ni lernis per agoj, gestoj, montrado... pli vive ol per klarigoj.

FN: Ĉu vi partoprenis en klubo aŭ kongresoj?

AO: Jes, kelkaj el ni iris al klubo, sed ne ĉiuj. Mi estas la sola, kiu jam vizitis kongresojn.

Por teni la intereson de la infanoj kaj adoleskantoj, mi ofte organizis kantojn, etajn teatraĵojn kaj ludojn.

FN: En kiuj situacioj vi uzas Esperanton?

AO: Plej ofte por tiel nomataj “koditaj mesaĝoj”. Do ne temas pri sekreta spionado, sed simple maniero paroli pri familiaj aŭ teknikaj aferoj en publikaj lokoj — ekzemple en buso aŭ bazaro — sen ke la aliaj komprenu nin.

FN: Kion signifas por vi esti parto de Esperanto-parolanta familio?

AO: Por mi, tio signifas kreski en etoso en hejmo plena je amikeco kaj bona interkompreno.

FN: Kion vi konsilus al familioj, kiuj volas komenci?

AO: Mi dirus: uzu la rektan metodon, kaj ne atendu perfektecon. Komencu tre simple — per salutoj kiel “bonan matenon”, “bonan apetiton”, kaj per nomado de aferoj en la kuirejo. La plej grava estas esti regula.

FN: Ĉu vi miksas Esperanton kun aliaj lingvoj?

AO: Mi mem ne, sed aliaj en la familio foje jes. Ili miksas kun la franca en la sama frazo, kiam mankas vorto.


Tamen por infanoj pli bonas teni la lingvojn apartaj — ekzemple Esperanto ĉe la tablo, la franca en la lernejo.

FN: Ĉu vi uzas lernolibrojn?

AO: Tute ne. Ni preferas rakonti historiojn, kanti... kaj ofte ni rakontas fabelojn.

FN: Kiujn aliajn lingvojn la infanoj parolas?

AO: Ili parolas la francan kaj ankaŭ lokajn lingvojn. Kaj danke al Esperanto, ili fariĝis multe pli scivolemaj pri la mondo — kaj rapide komprenas aferojn.



Bonvenon al IJK 2026 en Tiana, Katalunio!

El la interreto



La 82-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO okazos en Tiana, Maresme apud Barcelono en Katalunio (Hispanio) de **la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026**. La lasta IJK okazinta en Hispanio estis IJK 2018 okazigita en Badajoz; la lasta IJK okazinta en Katalunio estis IJK 1968 en Taragono. Krom tiuj du ne okazis alia IJK en Hispanio.

La 82-an IJK organizas la internacia Kongresa Komisiono (KK) gvidata de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ), kiu gastigas la kongreson.

Partoprenu en la 82-a IJK por sperti tre maloftan plenan suneklipson, ĝui regionon riĉan pri kulturo, historio kaj gastronomio, kaj pasigi varman someron ĉe belaj plaĝoj kaj verdaj arbaroj kun esperantistoj de la tuta mondo!

La kongreso okazos en historia gastejo nomata *Alberg La Conreria*, impone sur monto super la municipo.

Ĉu vi scias kio estas IJK? Ĉu vi konas ĝiajn organizantojn, TEJO, KEJ, kaj la Kongresan Komisionon? Poste legu pri la gastiga lando Katalunio. Malkovru la belan kongresejon kaj la diversajn loĝeblojn, kaj sciu kiel alveni al ĝi. Kaj nun vi certe volas veni, ĉu ne? Rigardu kiuj aliaj homoj jam aliĝis, kontrolu kiom multe vi pagus, kaj plenigu la aliĝilon!

Vi povas aliĝi al la oficiala babilgrupo kaj eka-boni nian informkanalon en Telegramo. Se vi havas demandojn aŭ proponojn, simple skribu al ni. Venu pasigi eksterordinaran kaj memoringdan someron kun ni!

<https://ijk2026.tejo.org>

ESTRARO 2025/2026		tejo
	PREZIDANTINO Ana Ribeiro	
	VICPREZIDANTO Ikvero Almeida Silva	
	ĜENERALA SEKRETARIO Jean de Dieu Kikako	
	KASISTO Mihary Andrianirina	
	ESTRARANO Ranja Lydie Zafinifotsy	
	ESTRARANO Espoir Ngoma Kasati	

Estraro de TEJO POR 2025-2026

Post ŝanĝoj en la Estraro de TEJO, la Komitato elektis du novajn estraranojn por la mandato 2025-2026. Jean de Dieu Kikako iĝis Ĝenerala Sekretario kaj Ranja Lydie Zafinifotsy iĝis senofica estrarano. Agrablan kunlaboron kaj sukcesan agadon!

La nuna Estraro estas:

Prezidantino: Ana Ribeiro

Vicprezidanto: Ikvero Almeida Silva

Ĝenerala Sekretario: Jean de Dieu Kikako

Kasisto: Mihary Andrianirina

Estrarano: Ranja Lydie Zafinifotsy

Estrarano: Espoir Ngoma Kasati

Dankon al Snehaĝa Venkatesh kaj Alexandre Basque pro ilia ĝisnuna laboro.

ESPERANTO EN NORDA KIVUO

Honoré Sebuhoro – Rustshuru



Esperanto vivas en Norda Kivuo (Demokratia Respubliko Kongolando) ekde la jaroj 1980-aj !

KELKAJ PIONIROJ DE ESPERANTO EN RUTSHURU

Fakte, Esperanto komencis disvastiĝi en Rutshuru en la 1990-aj jaroj danke al la tiamaj aktivuloj. Bedaŭrinde, la disponeblaj informoj ne klare mencias la nomojn de la homoj, kiuj enkondukis Esperanton en la Teritorion Rutshuru, tamen ni scias, ke instruistoj kaj membroj de la civila socio ludis ŝlosilan rolon en la disvastigo de Esperanto en la regiono. Tiucele ili organizis kursojn kaj seminariojn.

Hubert Ntawu Hakizumwami

S-ro **Hubert Ntawu Hakizumwami** estis Esperanto-aktivulo en Rutshuru antaŭ ol transloĝiĝi al Goma, la ĉefurbo de Norda Kivuo.

La disponeblaj informoj ne montras la precizan daton, kiam s-ro Hubert Ntawu komencis instrui Esperanton. De 1990 ĝis 1997; S-ro Hubert Ntawu kreis klubon *Virunga Esperanto-Klubo (V.E.K)* kaj varbis por ĝi junajn intelektulojn por lerni Esperanton. Kelkaj lernis ĝin kun entuziasmo. El inter tiuj lernintoj estas: *Asumani Bengantundu, Djuna Kashira, Huseni*

Kalumbi, Adrien Serupfune, Vétérinaire Bwenge, Hubert Mas-hukane kaj lia edzino.

Li foje organizis renkontiĝojn kun esperantistoj de sia klubo por ebligi plifortigi la fratecon inter ili kaj antaŭenigi praktikadon de Esperanto. Tiel, S-ro Hubert Ntawu ludis esencan rolon en la disvastigo de Esperanto en Norda-Kivuo. En 2003, li renkontis s-rojn *Alexis, Asumani Bengantundu,*



Alphonse Waseka Kamango, Djuna Kashira (nuntempe loĝanta en Usono), kaj kune kun ili fondis la klubon – Goma Esperanto Klubo, kiu

pli poste naskis la asocion Solidarité Bonne Volonté, Solidareco Bona Volo (SBV), tamen sen *Djuna Kashira* kaj *Hubert Ntawu*.

Honoré Sebuhero



Sinjoro **Honoré Sebuhero** estas ŝlosila persono en la esperantista movado en Teritorio Rutshuru. Li naskiĝis la 3-an de marto 1974 en Kavumu, li estas edziĝinta kaj patro de kvin gefiloj.

Kiel Honoré Sebuhero sukcesis lerni Esperanton?

S-ro Honoré Sebuhero malkovris Esperanton en 2005 danke al la influo de du fakuloj: la karmemoraj *Renato Corsetti* kaj *Hans Bakker*, do li memlernis Esperanton perkoresponde kun foja direktado de tiuj du famaj Esperanto-

pioniroj. Lia engaĝiĝo igis lin krei la klubon Verda Stelano-Klubo (V.S.K) en 2009 kaj ekinstrui Esperanton al studentoj en la *Instituto Béthanie* ekde 2012. Pli poste de 2018 ĝis hodiaŭ li sukcesis zorgi pri infanoj de la kvartalo.

Honoré Sebuhero partoprenis ankaŭ en radiospektakloj gvidataj de Joel Muhire, kiel ekzemple tiu de Alliance FM, kie li diskutis pri la nomoj de eŭropaj landoj en Esperanto. En aŭgusto 2024, li partoprenis en la Universala Kongreso de Esperanto en Arusha, Tanzanio.

La sindediĉo de Honoré Sebuhero multe kontribuis al la disvastigo kaj enradikiĝo de Esperanto en Rutshuru, antaŭenigante interkulturan komunikadon kaj pacon en la regiono.

Joel Muhire

S-ro **Joel Muhire** (aŭ: **Muhire Ndaziboneye Joël**) estas e-aktivulo el Rutshuru, nuntempe loĝanta en Goma. En marto 2008, li malkovris Esperanton danke al S-ro Honoré Sebuhero, kiu vekis en li la deziron lerni tiun ĉi lingvon.



Malgraŭ la obstakloj, li sukcesis ellerni Esperanton kaj ekde 2010, li fariĝis membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Joel ludis ŝlosilan rolon en la disvastigo de Esperanto en Rutshuru. Kelkaj el liaj atingoj: enkonduko de Esperanto en la orfan elementan lernejon Njiwa, enkonduko de Esperantoprogramo en lokajn radiostaciojn, i.a. RACOU FM, ALLIANCE FM kaj RACOVE FM, RTEDH FM. En aprilo 2018, kiam vizitis la klubojn de Rutshuru nia karmemora Emile Malanda, Joel Muhire organizis Esperantistan renkontiĝon en Kiwanja kunigante 79 partoprenantojn, el ili estis lokaj ĵurnalistoj kiuj intervjuis lin pri Esperanto. Krom lia engaĝiĝo pri edukado, Joel Muhire

okupiĝas ankaŭ pri muziko. Li starigis koruson SENOPONE ANTAŬEN kaj produktis albumon de kantoj en Esperanto kun la titolo “*Esperanto, ilo de paco*”. Liaj kantoj estas cetere spektblaj en Jutubo. Pli poste li registris aliajn kantojn, ekz-e *SAT Amikaro*, *Bonvenon al la 109a UK*, *UEA estas Nia*, ... li kreis klubon en junio 2017, Rondo Esperantista de Kiwanja (REK) kiun prizorgas nuntempe lia ekslernanto Justin

Ndagijimana ; li instigis krei du aliajn klubojn en Bunagana kaj Shanje – Suda Kivuo, bedaŭrinde ambaŭ ili ne plu funkcias pro la milito.

Joel Muhire estas ankaŭ aŭtoro de la verko: *Kiesperanto Kwetu*, lernolibro de Esperanto por Svahilparolantoj. Li ankaŭ reprezentas ILEI-n en DR Kongo kaj redaktas la revuon Konga Stelo.

Internacia tago de virinoj

MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA INTERNACIA VIRINA TAGO

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

Okaze de la Internacia Virina Tago 2026, Universala Esperanto-Asocio (UEA), organizo en Konsulta Statuso kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, salutas virinojn kaj knabinojn tra la mondo kaj reasertas sian engaĝiĝon antaŭenigi genran egalecon kaj virinajn rajtojn, kunlabore kun aliaj civilsociaj organizaĵoj kaj internaciaj partneroj.



ciajn leĝojn, malfortajn aŭ neefikajn jurajn protektojn, kaj damaĝajn praktikojn kaj sociajn

normojn, kiuj subfosas la rajtojn, sekurecon kaj dignon de virinoj kaj knabinoj.

Genra egaleco kaj plena partopreno de virinoj en ĉiuj sferoj de la vivo estas esencaj por justa kaj daŭripova evoluo. Sen efektiva aliro al justico, edukado, informo kaj decidprocezoj, rajtoj restas nur deklaroj surpapere.

UEA atentigas ankaŭ pri la graveco de lingva justeco. Por ke virinoj kaj knabinoj povu plene partopreni en la politika, ekonomia kaj kultura vivo, ili bezonas egalan aliron al lingvaj rimedoj - inkluzive de edukado en la gepatra lingvo kaj aliro al pliaj lingvoj por internacia komunikado. Lingva malegaleco plifortigas aliajn formojn de malegaleco. Per la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝia tutmonda reto de parolantoj, la Esperantomovado kontribuas al pli inkluziva internacia dialogo kaj al pli forta voĉo de la tutmonda civila socio, inkludante virinojn kaj knabinojn.

UEA alvokas ĉiujn koncernajn instancojn agi decide kaj kun respondeco, por ke ĉiuj virinoj kaj knabinoj -- sen escepto -- ĝuu plenajn rajtojn, egalan protekton kaj realajn ŝancojn disvolvi sian potencialon.

Pri la 8-an de marto

El interreto

Internacia tago de virinoj (aŭ virina tago) estas internacia tago festata la 8-an de marto ĉiujare. Tiu ĉi tago estas grava festotago pri la ekonomiaj, politikaj kaj sociaj rezultoj de virinoj. Oni rememoras tiun tagon ankaŭ pro la incendio en la Fabriko Triangulo (en Novjorko, Usono, 1911), kie perdis la vivon pli ol 140 virinoj. La ideo pri tiu festotago estiĝis ĉe trapaso de la 20-a jarcento, kiam la rapida monda industriiĝo kaj ekonomia ekspansio kondukis al protestoj por pli bonaj laborejaj kondiĉoj.

Protestoj okazadis la 8-an de marto dum la sekvaj jaroj kaj Usono konsideris la 8-an de marto kiel virinan tagon. La 2-a Internacia Socialista Virina kunveno en 1910 (en Kopenhago) akceptis la proponon de Clara Zetkin, ke ĉiujare la 8-a de marto estu dediĉita batalotago por la socia, politika, ekonomia kaj familia egalrajteco de virinoj. La unua Internacia tago de Virinoj en la sekva jaro estis granda sukceso kun pli ol unu miliono da partoprenantoj. Tiun sukceson ombris tragedio tiumonate, kiam la 25-an de marto 1911 en la incendio en la Fabriko Triangulo mortis pli ol 140 teksaĵlaboristinoj.

La Unuiĝintaj Nacioj oficialigis la tagon en 1977 invitante ĉiun landon en la mondo festi tiun tagon por la rajtoj de virinoj.

La virino

La virino pardonas, eĉ, se venas la vundo,
eĉ, se oni ŝin formas laŭ alia mondo,
ĉar tiel la koron de l' virino kreis Dio:
en ĝi vivas ĉio, kio mankas al viro.

La virinoj estas veraj brilperloj de l' vero,
pli bele, ol juveloj lumas ilia espero,
sed noktan koloron ilia lumo ricevas,
kiam larmo silente en la koron enfluas.

Ĉiu virina animo – rozo el Eden' ĝardeno,
eterna sorĉo por deziro de l' alia ĝeno,
kaj plej dolĉan parfumon la rozo elspiras,
kiam vira manplato ĝiajn petalojn tuŝas.

Tradukis: Erika Godo

Bondeziro de Wu Guojiang

Prezidanto de Liaoning-a Esperanto- kultura Klubo (LEKK), Ĉinio.

Karaj esperantistinoj,

Bing Xin, subtenanto de Esperanto kaj fama ĉina verkistino, diris: Se ne ekzistus virinoj en ĉi tiu mondo, perdiĝus almenaŭ kvin dekonoj de la vero, ses dekonoj de la boneco kaj sep dekonoj de la beleco. La konata diro havas profundan signifon: virinoj estas gravaj en la mondo. Do, esperantistinoj estas same gravaj por la Esperanto-movado. Ili plivigligas nian movadon per aktivadoj, kaj pli-beligas nian Esperantujon per diligenteco. Okaze de la Internacia Virina Tago mi kaj LEKK esprimas festajn salutojn kaj bondezirojn al ĉiuj esperantistinoj ĉie en la mondo.

Unua Tanzania Esperanto-Safaro

Didi Weidmann – Tanzanio

PArtoprenu de la 7-a ĝis la 21-a de junio 2026 la Unuan Tanzanian Esperanto-Safaron, kiu vojaĝigas vin de Daresalamo tra la Nacia Parko Saadani, Ngorongoro, Serengeto, la Esperanto-Mezlernejo en Marambeko al Mwanza (Mŭanzo), kie vi partoprenos la Unuan Landan Kongreson de Esperanto en Tanzanio post la 109-a UK, inter la 17-a kaj la 19-a de junio 2026. Tio estas unika okazo sperti la senkomparan pejzaĝon, plantaron kaj bestaron de Tanzanio kaj konatiĝi kun ties juna kaj vigla Esperanto-movado. Unu fojon en via vivo vi nepre devas viziti Tanzanion, kie vivis antaŭ du milionoj da jaroj en Ngorongoro la unuaj homoj. Ĉar la homaro estiĝis en Tanzanio, fakte iel ĉiuj homoj sur la Tero estas Tanzanianoj. Do venu hejmen!

https://allsprachendienst.ch/esperanto/files/Unua-Tanzania-Esperanto-Safaro-Broshuro_5zmly0dz.pdf

La evento taŭgas ankaŭ por komencantoj aŭ komencontoj de Esperanto, ĉar dum la safaro intense instruos Esperanton. Do, se vi venas kun via partnero, kiu ankoraŭ ne scipovas nian lingvon, ankaŭ ŝi aŭ li post reveno estos esperantisto.

Adresoj de Didi Weidmann:

Boko Magengeni, Good Neighbourhoud Street. Mbweni, Kiondoni. Dar Es Salaam.

P.O.Box 60285 Kawe Dar Es SaLaam.

Tel. +41796102572 (Svisa telefonnumero, D.M. Weidmann)

Tel. +255 760 093 754 (Tanzania telefonnumero, D.M. Weidmann)

Retadreso: didi@esperanto.ch.

Interreta kunveno de SAT Amikaro kun afrikaj amikoj

Okaze de la 78a kongreso de SAT Amikaro okazonta en aprilo 2026, de la 4a ĝis la 6a, la organizantoj kiel kutime invitas afikajn amikojn prelegi en reta programo sabaton, la 4an de aprilo. Ili parolos unu post la alia, laŭ la ordo ĉi sube (laŭ la francaj horoj):

- **de la 15a horo** : Enkonduko de la posttagmezo kaj salutojn de SAT Amikaranoj kiuj ne povas ĉeesti surloke, **ekz Jean François BLIN enpaĝiganto de LA SAGO.**
- **de la 15a horo 15 ĝis 15h 30** : Alphonse Waseka
- **de la 15a horo 30 ĝis 15a horo 50** : Joel Muhire
- **de la 15a horo 50 ĝis 16h10** : Honoré Sebuho

Paŭzeto

- **de la 16a horo 20 ĝis 16h50** : François

La renkontiĝo okazos per Jitsi : <https://meet.jit.si/SAT-AMIKARO>.



Filantropia vizito en la Lernejo Lève-moi



Faustin Sebatana – Goma

En la 7a numero de Konga Stelo aperis detala raporto pri la agado de la asocio ETIMARKI PAMOJA HAKUNA MATATA. Denove, jen sube alia raporto.

La elementa lernejo *Lève-Moi* situas en la teritorio Nyiragongo, en la ĉirkaŭaĵo de la urbo Goma (Norda Kivuo), en la orienta parto de Demokratia Respubliko Kongo. Tiu lernejo ne nur funkcias kiel ordinara eduk-institucio, sed ankaŭ kiel akceptejo por forlasitaj, neglektitaj kaj orfaj infanoj, havantaj tre malfacilajn vivkondiĉojn.

Pro la multaj bezonoj identigitaj en tiu lernejo, nia asocio **ETIMARKI PAMOJA HAKUNA MATATA** decidis organizi homhelpan viziton por subteni tiujn infanojn.

Malfacila kunteksto en Goma

Jam de preskaŭ unu jaro, la urbo Goma kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj travivas tre akutan sekurecan kaj humanitaran situacion pro la oftaj konfliktoj kaj militoj en la regiono. Multaj familioj estis disigitaj, kaj multaj infanoj troviĝis sen gepatroj aŭ sen familia protekto. En tiu kunteksto, la lernejo *Lève-Moi* prenis kuraĝan iniciaton: *akcepti kaj protekti* infanojn viktimojn de la militoj kaj sociaj malfacilaĵoj, por doni al ili edukadon kaj minimuman protekton.

Speciala tago por la infanoj

La tago de nia vizito estis escepta momento por tiuj infanoj, kiuj ofte restas forgesitaj de multaj humanitaraj organizoj.

La membroj de la asocio *ETIMARKI PAMOJA HAKUNA MATATA*, konsistantaj ĉefe el junaj volontuloj engaĝitaj en la bonfarto de la komunumo, decidis pasigi momenton de ĝojo kaj espero kun la infanoj.

Dum la vizito ni kunhavis momentojn de interago kaj ĝojo kun la infanoj, kuraĝigis ilin pri la graveco de lernado, alportis lerneajn materialojn. En regiono kie la sono de armiloj ofte rompas la trankvilon de la vivo, tiuj infanoj bezonas ankaŭ momentojn de rideto, espero kaj homa varmo, por almenaŭ provizore forgesi la malfacilaĵojn.

La kategorioj de infanoj prizorgataj de la lernejo

La lerneja komplekso *Lève-Moi* zorgas pri infanoj kiuj apartenas al tri ĉefaj kategorioj:

1. Orfaj infanoj

Tiuj infanoj perdis siajn gepatrojn dum la multaj militoj en nia regiono. Ili ricevas senpagan edukadon kaj loĝas en la orfejo de la lernejo. Tamen la institucio alfrontas gravajn defiojn, ĉar tiuj infanoj bezonas sanservon, nutraĵojn, lerneajn ilarojn, psikologian subtenon... Bedaŭrinde, la lernejo havas tre limigitajn rimedojn por kovri ĉiujn tiujn bezonojn.

2. Infanoj el tre malriĉaj familioj

Tiuj infanoj ne loĝas en la internulejo. Ili venas ĉiutage por lerni kaj poste revenas al siaj hejmoj. Iliaj familioj ofte ne kapablas pagi la lerneajn kotizojn, kaj foje ili pasigas plurajn monatojn sen kontribui al la funkciado de la lernejo aŭ la subteno de la instruistoj.

3. Infanoj en malfacila familia situacio

Estas ankaŭ infanoj, kies gepatroj plu vivas, sed pro familiaj konfliktoj aŭ nerespondeco ili forlasis siajn infanojn.

Multaj el tiuj infanoj riskas fariĝi stratinfanoj, viktimoj de delikteco socie marĝenigitaj personoj.

La lernejo provas oferti al ili edukon ŝancon kaj sekuran medion, sed sen ekstera helpo tio restas tre malfacila.

Mesaĝo de la lerneja direktoro

Dum nia vizito, la direktoro de la lernejo esprimis sian profundan dankon per tiuj vortoj:

“Ni estas tre feliĉaj pro la ĉeesto de ĉi tiu asocio de junaj volontuloj, kiuj montras veran sindediĉon por helpi la novan generacion.

Multaj el niaj infanoj venas al la lernejo sen bazaj lern-ilaroj pro manko de rimedoj.

Hodiaŭ vi alportis al ili valoran helpon.

Ni esperas, ke en la estonteco ni povos daŭre kunlabori por subteni ĉi tiujn infanojn, precipe komence de la nova lerneja jaro.”

Alvoko al subtenantoj kaj partneroj

La asocio *ETIMARKI PAMOJA HAKUNA MATATA* restas firme engaĝita en la subteno de infanoj en malfacilaj situacioj en nia regiono.

Tamen, por daŭrigi kaj plivastigi niajn humanitarajn agadojn, ni bezonas la subtenon de bonvolaj partneroj, donacantoj kaj institucioj, kiuj kredas je edukado kiel ŝlosilo al pli bona estonteco.

Ni invitas ĉiujn personojn, organizaĵojn aŭ instituciojn kiuj deziras kontribui al ĉi tiu nobla misio kontakti nin por kunlaboro aŭ subteno. Kune ni povas redoni esperon al infanoj, kiuj plej bezonas ĝin.

Retadreso: pamojahakunamatatardc@gmail.com

KUTIMU AGI NUN

Prime Nsabimana – Goma

Vi, kiu ne volas agi nun jen kelkaj simplaj demandoj al vi. Mi esperas ke tiuj ĉi demandoj havigos al vi novajn pensmanierojn pri la vivo. Viaj novaj pensmanieroj povas inspiri kaj instigi vin ekagi saĝe kaj plibonigi vian vivon.

Kiom da tempo restas al vi por agi nun? Kion vi verdire atendas? Ĉu vi atendas ke vi havos sufiĉan monon? Tiu tempo kiam vi havos sufiĉan monon neniam venos. Ĉu vi atendas perfektan tempon? Ne trompiĝu, tiu tempo neniam venos. Ĉu vi atendas ke ĉiuj obstakloj malaperos? Ĉu vi kredas ke eblas antaŭeniri sur la vojo de la vivo sen neniam fronti defiojn? La maldolĉa vero estas ke, ju pli vi atendas ke ĉiuj defioj malaperu des pli ili multiĝas kaj amasiĝas sur via vivvojo!!! Aŭ vi atendas ke iu komprenos vin kaj donos al vi permeson? Memoru bone ke multaj el tiuj kiuj ŝajnas esti viaj amikoj, ne volas vidi vin sukcesi. Pro tio ili neniel kuraĝigos vin. Il uzos ĉiajn eblojn por malsukcesigi vin sed sen via ruzo vi ne rimarkos tion.

Ĉu vi atendas ke vi havos memfidon aŭ kompetenton? Ambaŭ memfido kaj kompetento ve-

nas kiam vi estas aganta. Iu fama usona pedagogo *John Dewey* iam diris Angle: *learning by doing*. Esperante tio estas: lerni agante. Ĉu vi ne volas agi nun pro timo malsukcesi?

Ĝis nun sciiĝu ke via timo ekzistas nur en viaj pensoj. Ĝi estas imaga timo, fantoma timo. Vi povas pereigi tian timon se vi agas, ne morgaŭ, ne post semajno, monato, jaro, nur nun. Kial nur nun? ĉar ofte morgaŭ, poste, ... signifas "*neniam*". Kiam ajn vi prokrastas vian revon, vi estas rifuzanta al vi orajn okazojn por plenumi ion gravan en via vivo.

Fine, se vi volas sukcesi, se vi volas realigi vian revon, se vi ne volas bedaŭri poste, ĉesu heziti, ĉesu prokrasti, ĉesu atendi perfektan tempon ktp. Decidu agi nun. Ne zorgu pri cirkonstancoj. Atendu nenion. Komprenu, ke nun estas ĉiam la bona momento por agi, kaj tio veras por ĉiu ajn, kiu volas vivi sukcesan vivon. Ie en la evangelio estas skribite: *zorgu pri la nuna tago ĉar la morgaŭa tago zorgos pri si mem*.

Proverbo : Kaptu la sekundon kiu neniam revenos !



Kara leganto,

Ĉu vi estas kongolandano? Se jes, bone. Kunhelpu do florigi la e-movadon en DR Kongo partoprenante en poresperantaj klubaj aŭ asociaj agadoj, kaj ne forgesu raportoj pri tio !

Viaj spertoj povas sendube avantaĝi al aliaj por pli energie aktivi en la movado.

Ni tre ŝatus ankaŭ legi de niaj eksterlandaj legantoj.

Redakcio.

Stulta mielvendisto

Joel Muhire – Goma

En vilaĝo vivis mielvendisto. Iun tagon li prenis sian mielsitelon, tranĉilegon, alumeton kaj laŭiris vojon arbaren por ĉerpi mielon el siaj abelujoj. La vojo estis longega kaj laciga, sed tio ne gravis. Alveninte, li ekbruligis fajron por dispeli la abelojn kaj komencis la ĉerpadon de la mielo kaj finis la laboron kiam ekkrepuskiĝis. Li do ekrapidis hejmen sed pro nehavo de lumigilo, li devojiĝis kaj ekerarvadis en la arbaro. Malbonŝance, li enfalis profundan fosaĵon kiun ĉasistoj fosis por kapti bestojn. Li ekbedaŭris: Ho, Dio mia, kion mi faru por eliri el tiu profundaĵo? Li ne havis lumigilon, kaj estis jam mallume. Li komencis helpopete kribi kun espero, ke iu preterpasanto eble aŭdos lin: Ĉu iu preterpasas proksime al ĉi tie? Bonvolu veni, mi petas elpreni min el tiu profundaĵo, bonvolu kompati min, mi mortos.... Post minutoj da vekriado, iu ĉasisto ankaŭ malfrua por hejmenreveni, kaj rapidante preter tiu loko, aŭdis la petkrion. Li atente aŭskultis kaj aŭdis ke temas pri voĉo de viro. Li eklumigis sian torĉon, kaj iris ĉirkaŭexplori, kio okazis al la krianto. Alveninte ĉe la fosaĵo, li ekparolis kun la viro el la profundaĵo, scivolante kiel li enfalis en tiun best-kaptejon! La mielvendisto respondis: Mi ĉerpis mielon en la arbaro ĝis komencis iĝi malhela; kiam mi finis la laboron, mi ekrapidis hejmen, kaj ĉar mi ne havis lumigilon mi tuj perdis la vojon kaj oj! Mi ekfalas en la fosaĵon. Bonvolu savi min, mi petas. Mi vere estos tre danko al vi. La ĉasisto respondis: ankaŭ mi malfruas reveni hejmen, sed tamen mi helpos vin kun unu simpla

kondiĉo, elektu inter tio: ĉu mi tiru supren vin aŭ la mielon!

La viro, esperoplene diris: mi elektas min mem. La ĉasisto ĵetis al li ŝnuron kaj ektiris lin supren. Antaŭ ol atingi la supron, tiu viro ekbedaŭris forlasi sian mielon kaj petis la ĉasiston: Bonvolu enlasi min reen por ke mi gustumu iomete la mielon. La ĉasisto konsentis. Li komencis suprentiri lin duan fojon, trian fojon kun la sama peto enlasi lin por ioma gustumado el la mielo. La kvaran fojon li diris: kara ĉasisto, pardonu min, ĉi-foje mi ne plu petos reveni en la profundaĵon por gustumi la mielon, bonvolu! En si obstinis lia koro ke li ne devas forlasi sian mielon. Li prenis la mielujon, ligis ĝin ĉe la kruro kaj petis denove al la ĉasisto suprentiri lin. Tiufoje la ĉasisto trovis ke li fariĝis tro peza kaj demandis: Kial vi ĉi-foje tro pezas? Ĉu vi kunprenis vian mielon? Li neis. La ĉasisto forte kun tro da peno tiris la ŝnuron, bedaŭrinde ĝi rompiĝis.

La ĉasisto tre kolera diris: Mi venis savi vin sed pro via stulteco kaj nevolo esti savita jen mia ŝnuro estas rompita. Do, vi multe pli ŝatas mielon ol vian propran vivon, tranoktu tie, eble morgaŭ iu venos elpreni vin. Kaj li foriris.

La mielvendisto, funde en la best-kaptejo ne scii kion fari kaj pro honto silentis. Tiun nokton ektondris kaj forta pluvo invadis la arbaron. La pluvakvo rampis de ĉie en la fosaĵon kaj plenigis ĝin. Tiu kompatinda viro fine mortis pro manko de decidemo inter tio ĉu li bezonas esti savita aŭ resti en danĝero kun sia mielo.



AI – Bildo

Leciono pri la Svahila lingvo

SUBJEKTAJ PRONOMOJ - SEKVO

3. MEMSTARAJ PERSONAJ PRONOMOJ:

MIMI	= mi
WEWE	= vi
YEYE	= li, ŝi, ĝi
SISI	= ni
NINYI	= vi
WAO	= ili

Ĉe ordinaraj verboj, memstaraj (aŭ aŭtonomaj) personaj pronomoj plifortigas la pronoman prefikson, neanstataŭante ĝin. Do:

Yeye anakwenda Arusha = Li iras al Arusha.

Mimi sisemi kiswahili = Mi ne parolas la suahilan

Aliflanke, ĉe la verbo **KUWA (= esti)** en la prezenco, la persona pronomo estas esenca por marki la personon, la verbo estas identa (sama) por ĉiuj homoj:

Mimi ni mwalimu	= Mi estas instruisto
Wewe ni mfaransa	= Vi estas franco
Yeye ni mkenya	= Li/ŝi estas kenjan(in)o
Sisi ni wanfunzi	= Ni estas studentoj
Ninyi ni wageni	= Vi estas la gastoj
Wao ni watanzania	= Ili estas Tanzanianoj

Same en la negativa formo, anstataŭigu **NI** per **SI**.

EKZEMPLE :

Mimi **si** mjinga = Mi **ne** estas stulta

Yeye **si** mkulima = Li **ne** estas farmisto, terkultivisto

4. SPECIALA PRONOMO: "-OTE":

-OTE kiu signifas: "**ĉio, ĉiuj**" povas esti uzata kiel memstara pronomo, aŭ povas akompani substantivon.

En ĉiuj kazoj, ĝi akordiĝas en klaso kun la substantivo al kiu ĝi rilatas.

Laŭ ĝia signifo, ĝi estas uzata pli ofte en la pluralo ol en la singularo.

KLASOJ	SINGULARO	PLURALO
1 M-/WA- (Kl / 2)	WOTE	
M-/MI- (Kl 3 / 4)	WOTE	YOTE
JI-/MA- (Kl 5 / 6)	LOTE	YOTE
KI-/VI- (Kl 7 / 8)	CHOTE	VYOTE
N- (Kl 9 / 10)	YOTE	ZOTE
U- (Kl 11/14/10)	WOTE	ZOTE

EKZEMPLOJ:

Mwili wote waniuma	Mia tuta korpo doloras
Lete visu vyote	Alportu ĉiujn tranĉilojn
Chakula chote kimeharibika	La tuta manĝaĵo estas difektita
Watu wote wamefika	Ĉiuj (homoj) alvenis

Ni ankaŭ povas asocii **-OTE** kun memstaraj pronomoj aŭ nombroj.

EKZEMPLE :

Sisi sote	Ni ĉiuj
Ninyi nyote	Vi ĉiuj
Sote wawili	Ni du (ni ambaŭ)
Nyote wawili	Vi du (vi ambaŭ)
(Vitabu) vyote viwili	Ambaŭ (libroj)
(Miti) yote mitatu	Ĉiuj tri (arboj)

VORTOLISTO

Mfanyakazi (wa-)	laboristo(j)
Msafiri (wa-)	vojaĝanto(j)
Mgiriki (wa-)	greko(j)
Mtanzania (wa-)	tanzaniano(j)
Mjinga (wa-)	idiotoj(j)
Mwashi (wa-)	masonisto(j)
Mkenya (wa-)	keniano(j)
Mwongo (wa-)	mensoganto(j)
Mlevi (wa-)	ebriulo(j)
Mzanzibari (wa-)	zanzibaro(j)
Mmasai (wa-)	masajo(j)
Mzazi (wa-)	parenco(j)

Nekrologo : Forpasis Emile Malanda

Emile Malanda forpasis la 5-an de januaro 2026 en Matadi, DR Kongo. Li estis esperantisto de Demokratia Respubliko Kongo, aginta ankaŭ en Sud-Afriko.



DKEJO kun profunda bedaŭro anoncas la forpason de sinjoro Emile Malanda, granda pioniro de Esperanto en DR Kongo. Lia sindediĉo kaj laboro por la disvastigo de Esperanto markis historion kaj inspiris multajn generaciojn. Ni, DKEJO, esprimas nian sinceran kaj profundan bedaŭron pro ĉi tiu granda perdo. Niaj pensoj estas kun lia familio kaj kun la tuta esperantista komunumo.

Adjévi Adjé : Unu el la longdaŭraj afrikaj aktivuloj kaj eks-kunordigantoj de la Afrika Komisiono de UEA, Emile Malanda forpasis hieraŭ je la 19-a horo en Matadio, 250 km de ties naskiĝurbo Mbanza Ngungu (DR Kongo).

Fernando Maia Jr. : Kara Adjévi, mi bedaŭras kaj kondolecas. Omaĝe kaj respektu al li, mi poluris la vikipedian artikolon kaj kompletigis ĝin. Biografieto pri li konsulteblas en https://eo.wikipedia.org/wiki/Emile_Malanda.

Gilbert Ndiokubwayo: Kondolencon al la biologia familio kaj al la tuta Esperanta familio. Estas vere tre malĝoje ekscii pri la morto de Emile Malanda. Mi konis lin kaj renkontis lin en Esperantaj eventoj, ĉefe en Nyanza Lac, Burundo kaj en Bunda, en Tanzanio kiam li estis kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA. Ke lia animo ripozu en paco!

Kizeyidioko Mayinda Arlain : La morto de Emile Malanda estas granda perdo por la tuta Eo-komunumo.

Joel Muhire : Mi bedaŭras multe ke forpasis mia amiko, Emile. Mi konatiĝis kun li unuafoje dum la 6a AKE en Tanzanio, en 2016. Dum sia rondvojaĝo en 2018 kiam li ankoraŭ estis kunordiganto de la Afrika Komunismo de UEA, kelkajn tagojn li pasigis en Kiwanja (Rutshuru) antaŭ ol pluiri al Goma kaj Sud-Afriko. Lia foriro estas granda perdo por lia familio kaj Esperantujo. Pacon al lia animo. *[En 2018, kiel kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA, Emile Malanda rondvojaĝis en la orientaŝtataj regionoj, Ruĝando, Burundo (Nyanza-lago), Uvira (Kiliba), Bukavu, Goma, Rutshuru (Kiwanja) kaj ĉie kuraĝigis esperantistojn reorganiziĝi. Li konsilis esperantistojn el Norda kaj Suda Kivuo krei ligan de esperantistoj. Bukuru Nabahena kiel prezidanto kaj Joel Muhire, sekretario starigis Ligon de Orientkongaj Esperantistoj, nome LOKE. Bedaŭrinde tiu ligo mortis post kelkaj monatoj pro manko de statuto. En februaro 2017, Emile Malanda iniciatis fejsbukan forumon, Afrikanoj Sub Unu Tegmento, ASUT kun celo stimuli skriban ekzercadon de la lingvo, krei amikan ligan inter afrikanoj kaj liveri freŝdatajn novaĵojn pri la evoluo de Esperanto aparte en nia kontinento kaj en la tuta mondo ĝenerale].*

Assane Faye : Emile Malanda estis unue kaj ĉefe afabla homo, senantaŭjuĝa kaj intelekta malavara. Mi renkontis lin ĉe la 5-a Afrika Kongreso en Benino, kaj kun ĉiuj miaj kolegoj kaj Mireille Grosjean, ĝi estis vere memorinda momento! Nome de mi kaj de ĉiuj esperantistoj de Senegalo, ni esprimas nian plej sinceran kondolencan al lia familio kaj amatoj! Ripozu lia animo en paco!

Malekera Bonne Idée : Mi bedaŭras pro la morto de nia kara Emile Malanda. Kondolencojn al lia familio kaj al liaj esperantistaj amikoj.

Mramba Simba : Mi bedaŭras pro la forpaso de nia Emile Malanda, kondolencojn al la familio kaj al la tuta Esperantistaro. Lia animo ripozu en paco.

Aimé Patrick Manirakiza : Afriko ĵus perdis unu el siaj movfortoj, kiu ludis gravan rolon en la progreso de Esperanto sur la Afrika kontinento. Emile Malanda kuraĝigis multajn afrikajn junulojn havi spiriton de amo kaj laboro por ebligi ke Esperanto estu rekonata en diversaj lokoj de Afriko. Li partoprenis en AMO seminario en Burundo en la komunumo Nyanza-Lac en 2018 dum unu semajno. Li estis bonkora kaj pacema homo. Nome de la Afrika Komisiono de UEA, kaj en mia propra nomo, mi esprimas kondolencojn al la afliktita familio, kondolencojn al la Afrika Esperanto-mondo. Ke lia animo ripozu en paco.

Jeremie Sabiyumva : Estis granda ŝoko; granda perdo. Mi memoras liajn konsilojn. Lia lasta mesaĝo al mi estis ke li revenos al Burundo en 2026, por paroli pri la movado. Li lasis al ni la platformon ASUT: Afrikanoj Sub Unu Tegmento. La sola maniero honorigi lin estas daŭrigi kion li faris. Ni perdis grandan amikon de Esperanto.

LEE Jungkee : Kun granda malĝojo ankaŭ mi enviciĝas je via kondolenco-esprimo. Kiel mia iama kunlaboranto kadre de UEA, Emile estis mia kompetenta partnero. Li lasis grandan spuron por afrika movado. Kun profunda kondolenco mi esprimas mian malĝojon.

Paŭlo : Tristan informon, ripozu bone!

Byamungu Moses : Miajn sincerajn kondolencojn al lia tuta biologia familio kaj al ĉiuj ni afrikaj esperantistoj. Emile estis mia mentoro kaj trejnisto en multaj kampoj, precipe en asociaj aferoj kaj en la esperanto-movado. Ni renkontiĝis dufoje ĉi tie en Bukavu, en 2018 kaj 2020 kiam li venis por labora tasko. Dum tiu tempo, ni laboris kun li dum tri monatoj en la organizo nomata "APPUI AUX INITIATIVES HUMAINITAIRES ET DE DÉVELOPPEMENT (AIHD)" ĉi tie en Bukavu. Kune, ni faris ampleksan kontakton kun esperantistoj en Bukavu kaj establis Monda-Helpo/Bukavu-komitaton. Dum ĉi tiu tempo, li ŝanĝis la nomon de nia klubo "Amikoj de Zamenhof" al "Panzi Esperanto-Klubo". Krome, li estis konsilisto kaj valora partnero por nia esperanto-asocio en Bukavu, COPROFER. Mallonge, li estis bonkora kaj malavara homo. Ripozu pace kara Emile.

Elisée Byelongo : Estas malbonega novaĵo. Mi bedaŭras pri tio. Mi konis, kunlaboris kaj agadis persone kun Emile Malanda. Li kaj lia edzino iam vizitis mian hejmon en Kab-urbo antaŭ kelkaj jaroj kiam ili ambaŭ vivis en Sud-Afriko. Mi pensas, ke lia edzino ankoraŭ vivas ĉi-tie.

Mi tuj informos pri tiu perdo la Esperanto-Asocion de Sud-Afriko kies komitatano Emile Malanda estis, por kelkaj jaroj antaŭ la reiro al DRKongo.

Mi deziras, ke lia animo ripozon en eterna paco kaj kondolencas la biologian familion kaj same la esperantan.

Stefan MacGill : Miajn kondolencojn.

Espoir Ngoma Kasati : Tiu ĉi forpaso tre funde kaj dolorege tuŝis min. Mi verkis pri tio artikolon https://uea.org/vikio/La_forpaso_de_Emile_MALANDA,_Granda_Perdo.

Henriël Fidilalao : Mi ege bedaŭras pro lia forpaso ! Miajn sincerajn kondolencojn al la familio kaj la loka esperantistaro.

Léopold NZISABIRA : Miajn sincerajn kondolencojn al sia familio kaj al tuta komunumo de Esperanto. Emile Malanda, ni neniam forgesos vin, ke via animo ripozu pace !



La 3a Landa Burunda Kongreso, Nyanza Lac,
Burundo, 2018



Esperantistoj de Goma bonvenigas s-ron E. Malanda



Matĉo dum la 3a Landa Burunda Kongreso,
Nyanza Lac, Burundo



Emile Malanda kun pastoroj en Kiwanja

Forpasis Hubert Ntawu

La redakcio bedaŭras informi vin pri la forpaso de Hubert Ntawu HAKIZUMWAMI, ĵaŭdon vespere, la 1-an de aprilo 2026. Li estis unu el la unuaj pioniroj de Esperanto en Rutshuru kaj Norda Kivuo. Pli detale pri li legu sur la paĝo 6-a. Pacon al lia animo kaj kondolencojn al liaj familianoj !



Honoré Sebuho : Kun peza kaj profunda malĝojo ni ekscias pri la forpaso de nia tre amata esperanto-instruisto kaj gvidanto, Hubert Ntawu, okazinta en Nord-Kivuo, en Goma.

Vortoj ne sufiĉas por esprimi la profundan malĝojon, kiun ni sentas. Ni perdis ne nur instruiston, sed ankaŭ amikon, mentoron kaj inspiran figuron. Niaj pensoj kaj preĝoj estas kun liaj familio kaj konatoj. Kvankam li jam ne estas kun ni, lia spirito, lia amo por Esperanto kaj lia dediĉo vivos eterne en niaj koroj kaj en la E-movado, kiun li tiel forte subtenis. Ripozu en paco, kara instruisto ! Ni neniam forgesos VIN.

Alphonse WASEKA: Korŝirite, mi ĵus eksciis pri tio ke la pioniro de Esperanto en la oriento de Kongolando, s-ro Hubert Ntawu HAKIZUMWAMI forpasis. Li estis vera amiko kaj frato por mi. Mi ege bedaŭras!



Emile Malanda kaj Hubert Ntawu



Hubert Ntawu, Joel Muhire kaj Emile Malanda



Nickson Kasolene, Joel Muhire kaj Hubert Ntawu